

- Allee 1, Germanujo aŭ pere de Germana Esp-a Fervoj., Asocio, D-6 Frankfurt/M, Karlstr. 4-6. Prezo: antaŭvideble 6,00 DM plus 10% afranko.
- 629.113 Vortarelo por Aŭtomobilistoj (M. Jaumotte); Eld. de Internacia Esp. — Klubo Aŭtomobilista (IEKA) aperanta ekde Januaro 1965. laŭ daŭrigoj en »Aŭto-Revuo«; ĉ. 600t., alfabetaj laŭ la Eo-terminoj, kun traduko en 5 nacilingvojn. Ec-A-F-G I-NI
- 656.835 Vocabulaire Français-Eps., contenant les mots spéciaux á la philatelie (Lemaire); 21p.; eld. Groupe espérantiste de Paris, 1903. F-Eo
- 656.835 Philatelistische Fachausdrücke, zusammengestellt von H. Koch, München, ĉ. 500t.; aperis en Germana Esp. — Revuo 1960. (Marto ĝis Novembro) G-Eo
- 656.835 Cizojazyčná korespondenco pro filatelisty (Kucharsky). 225p.; eldonejo de transporto kaj komunikiloj, Praha 1962. Eo-Ĉh-R-G F-A-L-H-Hg
- 674 Lignaj juntoj ilustritaj, sugestataj nomoj (E. M. Rosher). 20p., 21 x 26 cm; kun krestomatio kaj multnombraj ilustraĵoj; hektogr. multobl., Haslemere 1959; havebla ĉe E. M. Rosher (adreso vd. supre!), kontraŭ 6 steloj afrankite. Eo
- 674 Ĉarpentiloj, sugestata Esperanta nomenklaturaro (E. M. Rosher). 10p.; 21 x 26 cm; kun krestomatio kaj pluraj ilustraĵoj; hektogr. multobl. 1959; havebla ĉe E. M. Rosher (adreso vd. supre!) kontraŭ 3 steloj aŭ 3 rpk. Eo
- 685.31 The shoemanis foreign terms (Wright). 103p.; 3-a eld. Leicester 1962. A-F-G-H-I Sv-NI-Eo R-H.

**SCIIGOJ DE LA TERMINOLOGIA CENTRO
(ISAE — TC—121)**

ESPERANTO EN SESLINGVA KOMPENDIO DE GEOLOGIO

En la eldonejo »Société d'édition d'enseignement supérieur«, 5, place de la Sorbonne, Paris 5e, dum 1965. aperis grava verko de **A. Cailleux, E. Ehrlich, R. Gérard, A. Gorodiski, J. — P. Michel kaj M. Moreno:**

ELEMENTS DE GEOLOGIE EN SIX LANGUES,

nome en la germana, hispana, esperanta, rusa, franca kaj angla. Ĉiu el la aŭtoroj verkis en nacia lingvo, escepte de s-ro **Robert Gérard**, Professeur Honoraire de l'Université de Paris, kiu verkis la esperantlingvan parton, entuziasme respondinte al la peto de mondkonata Profesoro **Cailleux** (Sorbonne, Paris), poligloto kaj granda amiko de nia Internacia Lingvo.

La bele aspektanta libro broŝurita, 191-paĝa de la formato 16 x 24 cm, estas precipe rimarkinda pro sia oportuna aranĝo de la ses lingvoj, nome tiamaniere, ke ebligas al la uzanto, kompari pecon de la teksto en ĉiuj el la menciitaj ses lingvoj, sen turni la folion. Do ĉu maldekstra paĝo enhavas proksimume 16 liniojn de la teksto en la germana, hispana kaj esperanta, kaj ĉiu dekstra paĝo la respektivan tekston en la rusa, franca kaj angla lingvoj. Tio plifaciligas kompari la saman tekston en la diversaj lingvoj kaj la terminojn en ili uzitajn.

La enhavo de la verko estas bonkvalita kaj interese; ĝi reprezentas eminentan kompendion en ĉiuj el siaj subsekcioj, nome **Ĝenerala Geologio, Geofiziko, Mineraloj, Petroj, Paleontologio, Geologiaj fenomenoj eksterdevenaj, Geologiaj fenomenoj interdevenaj, Stratigrafio kaj Deveno kaj elvolviĝo de Homo.**

La verko estas zorge reviziita kaj enhavas nur malmultajn preserarojn, malgraŭ ke la tipografistoj ne estis esperantistoj. Ekz-e sur p. 126, ant. 34, devas teksti »sinkkavaĵoj« anstataŭ »sinkavaĵoj«. Prof. **Gérard** prave enprenis en la vorttrezoron kelkajn novajn fakvortojn, nome

glaĉer/o (speciala glaci/ejo);
inlandsis/o (glacia kontinenta tegaĵo, kontinenta glaĉero);
isberg/o (flotanta glacimonto);
lem/o (argil/umo, ŝlim-tero);
strati/o (sedimenta tavolo, pp la geologia historio);
varv/oj (specialaj argil-tavoloj)

kaj aprobis leŭs/o' (aŭ 'lĉes/o') kiel la nomon de speciala flava kalkpetra ŝlimo.

Ni gratulas **Prof. Gérard** pro tiu bonega verkaĵo, kiu reprezentas ne nur eminentan pliriĉigon de la esperanta fakliteraturo, sed ankaŭ imitindan modelon por kromaj fakaj kompendioj verkotaj inkluzive de la Internacia Lingvo. En la 'Enkonduko' la aŭtoroj atentigis, »ke legi kvin fremdajn lingvojn ne estas atingeble por ĉiuj. Se ĉiuj laborraportoj estus tradukitaj en unu internacian lingvon, la fakuloj tutmondaj bezonus lerni nur unu lingvon.«

R. Haferkorn